Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-09 sendita el Roterdamo, la 22an de aprilo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj de AMO, listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj.

# Rekomendoj edukaj el AMO 33

Tiu 5-taga seminario venis al fino en la 20a de aprilo, kun po 5 studhoroj en kvar el tiuj tagoj, do entute kun 22 horoj da studado kaj diskutado, ofte etgrupe. La plimulto de la seminarianoj havas instruistan fonon; la posttagmezaj sesioj altiris pli ĝeneralan publikon pro la manko de paralelaj kursoj.

## Pritakso seminarifine

Dum la resumaj prijuĝoj gravis ĉefe la sekvaj konstatoj:


- Nur unu el la kvar gvidantoj parolis rekte pri komputiko.
- Oni volis pli da komputilaj ebloj esplori kaj eksperimenti.
- Valora estis la prezento pri la lernprocezo laŭ la skemo de Kolb (rigardi, senti, pensi, fari.

Praktika rezulto de la seminario: Unu partoprenonto ekuzos unuafoje skajpon pro la seminario – aliaj grupanoj helpos laŭbezone.

## Konkludoj kaj rekomendoj

Leviĝis el 40-minuta diskuto kvin rekomendoj:

- Movadanoj kaj aktivuloj havu pli bonan superrigardon pri la gamo kaj tipo de retkursoj, por diskonigi pri ĉiu la plustudajn iniciatojn je dispono aŭ kreindajn.




La respondeculo pri AMO, Sara Spanò, ĉe la rekomenda tabulo.

- Lingvemuloj esploru la mondon de lingvaj kafejoj starigitaj delonge de poliglotoj kaj aldonu Esperanton al la lingvaro. Manke de tiaj kafejoj, eblas starigi tion ĉirkaŭ Esperanto kun la posta aldono de pliaj lingvoj.
- UEA, ILEI, SAT, SAT-amikaro, EF kaj GEE (la francaj Landa Asocio kaj instruista sekcio) pli forte kunlaboru por krei kaj realigi kunajn edukajn projektojn, kiuj servu kiel modelo por aliaj mondpartoj.

- En la kursaro laŭ ajna livermetodo, la emfazo estu je la malpli facilaj aspektoj de la lingvo, ekzemple la (ne)transitiveco de verboj.
- La landaj kaj regionaj fortoj subtenu la pretigon de modernaj, allogaj kurslibroj, kiuj koncentriĝu je la interesoj kaj praktikaj bezonoj de lernantoj, laŭ la skemo vaste uzata por instrui naciajn lingvojn. La specifa ekzemplo estas cellingva lernkompleto (libro, retejo, son- kaj bild-materialoj, ekzercaroj) nun en preparo en Francio.

Vortoj: 295

======================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj aŭ elŝuteblaj ĉe:

http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

/



Fotoj: SMG